

Numero: 239.
Aprilo: 2012.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Kompreni unu la alian

Ni parolas kaj parolas, sed ni ne komprenas unu la alian. Prefere ni silentus. Vere ni sentas emon komuniki, diri kelkajn vortojn por nia kunulo.

La problemo estas en nia kapo kaj koro. Mankas la kompreno, la sincera homa parolo. Ni ofte tro multe volas diri kaj ni ne atentis pri la alia. Ankaŭ li aŭ ŝi nur parolas kaj parolas. La vortoj flugadas super niaj kapoj.

Neniu scias pri kio ni parolas. Ĉio sonas fremde kaj glacie.

Ofte silento povus varmigi nian koron alportante por ni iom da trankvilo kaj feliĉo.

Kial ni estas stultaj kaj ni ne komprenas la alian?

Kompreni la alian ne devas ellerni diversajn lingvojn. Sufiĉas aŭskulti nur la muzikon de la koro, kiu milde tiktakas en ĉies brusto.

Ho, kiom grandioza sento ĝi estas! Ĉielo kunfandiĝas kun la tero kaj anĝeloj ridetas ĉarme al vi.

Tiam vi trankviliĝas kaj vi deziras transdoni ĉi senton al via kunulo. Via buŝo ne ekmovas, tamen vi komprenas la alian, ĉar parolas la silento rakontante al vi belegajn historiojn.

Vi nur staras senmove en senfina dezerto, kie suno orumas la mondon. Tiam vi deziras paron por malkaŝi vian sekreton, sed la sablo ŝtopas ĉion kaj vi mutiĝas. Vin aŭdas la nigra silento, sed ĝi ne respondas, ĉar vi estas sola en la vasta dezerto, kie ĉie kaj ĉie estas nur granda kaj senfina nenio.

Kial plori, se voĉo via subiĝas en la sablon kaj por ĉiam kuŝas tie, kiel mortinto. Vi ne povas rifuĝi, ĉar la katenoj ne permesas vin. Viaj manoj kaj piedoj estas katenitaj. Vi ne povas movi. Vian korpon trakuros frosto kaj vintra tempesto glaciigas la tutan dezerton.

La sono malaperas. Anstataŭ varmeĝo la mondo estas frosta kaj helege blanka.

Vi parolas kaj parolas tra noktoj kaj tagoj. El vi fluas la vortoj kaj frazoj, kiel rivero. Vi ne estas komprenita, kvankam via deziro diri, kio kaŝiĝas en via koro.

Ne trankviliĝu kaj ĉefe ne laciĝu, ĉar la rezigno estas la morto de la volo. Devas alveni tempo, kiam viaj vortoj estos komprenitaj en la tuta mondo kaj oni aŭskultos vin, kiel en preĝejo la predikon de la pastro.

Kredu min, alvenos tiu brila tago, kaj vi estos eksterordinare feliĉa, kaj ridetante rigardos al la suno.

-Redaktanto-



Lingvolernanto

Mia amiko decidis lerni lingvon. Febre li prepariĝis kiun lingvon ellerni. Tio estis granda demando por li. Krom la lernejoj studhoroj li ne lernis fremdan lingvon.

En la lernejo li havis malbonajn travivaĵoj pri la lingvolernado. El la lernita lingvo li apenaŭ sciis ion. Kelkaj vortoj gluiĝis en lia cerbo. Sed tiujn li jam ne povis uzi rezulte.

Do, denove li devis komenci la lingvolernadon.

Lia ĉefo diris al li:

-Juna kolego mia, moderna homo nuntempe scias la anglan lingvon. Sen ĝi oni ne povas ekzisti en la mondo.

-Ja ĝi estis instruita ankaŭ en la lernejo. Mi jam forgesis ĝin.

-Kredu min, la lingvolernado estas tiel, kiel la biciklado. Oni ne povas forgesi ĝin.

Ili interkonsentis, ke li komencos lerni tiun ĉi lingvon, sed hejme lia avino kolereme diris al li:

-Nepeto mia, via avo perfekte parolis la germanan lingvon. En la koro de Eŭropo ĉiu saĝa homo scias tiun ĉi lingvon. Daŭrigu la familian tradicion kaj lernu ĝin. Poste vi povos ellerni ankaŭ la anglan lingvon.

Li estis obeema kaj bona knabo. Li ne deziris insulti la avinon. La maljunulino ĝoje konstatis, ke ŝi sukcesis konvinki lin pri la graveco de la germana lingvo.

Dum la tuta tago li cerbumis, kion fari? Kiun lingvon li elektu?

Posttagmeze en la radio li aŭdis:

-En la lastaj jaroj oni spertas ĉiutage la mankon de la scio de la rusa lingvo. Antaŭ 1989 en nia lando oni amase lernis la lingvon de Puŝkin. Se ni deziras komerci kun niaj orientaj najbaroj, tiam ni devas refreŝigi nian lingvoscion...

Ankoraŭ oni longe parolis pri la rusa lingvo, sed tion li jam ne aŭdis.

Kiun lingvon lerni? – Grava demando. Sed li ne sciis la respondon, ĉar ankoraŭ ni ne parolis pri aliaj necesaj lingvoj: araba, ĉina, japana, franca kaj multaj lingvoj, kiuj ekzistas en la mondo.

Kial ekzistas tiom da lingvoj?

Kiu scias la respondon?

-Ŝaŝa-



Tiam okazis

Ili sidis en la malgranda ĉambro triope, kaj mallaŭte babiladis. La fumo de la pipo tute plenumis la ejon, sed ĝia odoro estis agrabla kaj tial neniu protestis kontraŭ ĝi.

Ekstere pluvetis. Ĝi ne estis vera pluvo. Foje ekpluvis, foje ĉesis. Estis bone sidadi en la varma ĉambro kaj aŭskulti la maljunulon.

Li jam estis preskaŭ okdekjara. Ankoraŭ liaj okuloj vigle rigardis kaj sekvis la okazintaĵojn de la mondo.

Li estis tre parolema. Jam depost horoj li parolis senpaŭze.

Li rakontis pri sia juneco. La aliaj interesiĝante aŭskultis lin.

--Marde mi ricevis la invitordonon kaj alitage mi jam devis aliĝi ĉe la loka regimento. Ni ĉiuj sciis, ke ni iros al la batalkampo. Hitler bezonis pli multe da hungaraj soldatoj. Post trisemajna militekzerco ni estis envagonigitaj, kaj ek al la batalkampo foren en Ruslando.

Mi estis junulo sciante nenion pri la milito. Tiutempe ankoraŭ ĉiu kredis la venkon. Ni superos la rusojn. Kantante ni ekiris, esperante, post kelkaj monatoj heroe ni revenos. Kiom belega sonĝo ĝi estis.

Mi estis pafisto kredante, ke mia pafilo defendos min de ĉio. Onidire mi estis eminenta pafisto. en nia vilaĝo, kiel subsoldato, mi gajnis ĉiun pafkonkurson per aeropafilo. Poste ankoraŭ per veraj armiloj mi bonege pafis, en la regimento plej bone. Mi estis fiera je tio. Eble tio kaŭzis mian malbonŝancon. Mi ne povis imagi, ĝis mi havas kartoĉon la rusoj povos militkapti min vive.

Ankaŭ tiam en la januaro de 1942 mi deĵoris ĉe la rivero Don, kaj mi ege esperis la finan venkon. Mi ne povis imagi, ke la rusoj forpelos nin el niaj tranĉeoj, kaj tio estos la tragedio de la dua Hungara Armeo.

Tiumatene ekis terura kanonoatako daŭrante proksimume pli ol duonhoron, kaj poste komenciĝis la invasio kontraŭ ni.

Ni ekprovis kontraŭstari, kaj laŭ mi ni batalis heroe. Vere la historio raportas pri ĝi tute alie. Ni scias efektive, kio okazis tiam. Oni devis travivi tiujn malfacilajn horojn kaj tagojn. De apud skribotabloj eblas pensi pri tiu ĉi milito multe da stulteco, kio misinformas la nunan homon, kiu ne estis kun mi tie.

Ni repelis la rusojn multfoje, sed fine ilia troa superforto muelis nin, kaj krome ege malpliigis nia municio. Mi jam apenaŭ havis kartoĉon. Sen ĝi kiel batali kontraŭ bone armitaj Ruĝa Armeo. Krome ni estis tre lacaj kaj elĉerpitaj. Onidire la armean kuirejon trafis kanonkuglo, kaj ni restis sen nutraĵo. En mia manĝujo restis iom da seka pano kun kolbaso, sed ĝi estis malmulta.

Jam vesperiĝis, kiam alvenis ordono retiriĝi kaj ekprovi eviti, ke la rusoj ĉirkaŭu nin. Tio signifintus militkaptitecon.

Mi ne deziris fariĝi militkaptito. Tiam mi pensis, ke ĝi egalas kun la morto. Poste ankaŭ mi konvinkiĝis pri ĝi.

Mi pravis.

Mi kun miaj kamaradoj militkaptiĝis tute hazarde. Ni jam kredis kaj esperis, ke ni sukcesis saviĝi, kiam en iu vespero el la nenio ekaperis amaso da armitaj rusaj soldatoj. Ni ne havis eblon rifuĝi. Kiu ekprovis, tiu tuj estis mortpafita.

Mi ne povas priskribi per vortoj, kio okazis poste. Ni estis marŝitaj centojn da kilometroj profunden en Siberion. Multaj el ni frostmortis aŭ simple nur malaperis.

La kvarono de nia taĉmento atingis nur la lageron. Tie ni restis pli ol ses jarojn laborante, kiel sklavo.

Mi kun miaj samsortanoj hakis arbojn en la proksimaj, senfinaj arbaroj. Ĉiutage el la loĝantoj de la lagero mortis multaj malfeliĉuloj. Mi tiom maldikiĝis, ke kiam post ses jaroj hejmeniĝis, mia patrino ne rekoniis min. Ŝi ne volis malfermi la pordon antaŭ mi. Ŝi nur ripetadis plorante: „Vi ne estas mia filo. Li estas diketa fortulo. Ja vin forblovas la printempa venteto.”

Teruraj jaroj estis tiuj. Vi ne povas imagi. Kiom da suferoj dum tiuj ses jaroj.

Dank' al Dio, ĉio nur estas nur sonĝo. Pro tio ne enviu min!

La nunaj gejunuloj ne kredas min, kiam mi rakontas al ili pri mia Siberia restado. Certe ili pensas, ke ni feris tie kaj la tuta dua mondmilito estis nur granda aventuro.

Li suĉis el la pipo kaj eligis la fumon. La aliaj ankoraŭ atendis la daŭrigon de la rakonto. Sed la maljunulo subite silentiĝis. Liaj okuloj revante rigardis la plafonon, kvazaŭ tie li plu vidus la blankan Siberian pejzaĝon.

-Apáti Kovács Béla -



Poezio

Plori, plori, plori
de Endre ADY
elhungarigis K. KALOCSAY

**E. Ady (1877-1919) monumentigas la konfliktojn
de la moderna hungaro kun la vivo kaj mondo,
inter kredo kaj malespero per giganta
simbolkonstruo de sia liriko.**

Atendi dum nokthoro tinta,
ĝis ĉerko estos alveninta.

Pri l' mortint' sen demandofaro:
Tinkloŝi al la sekvantaro.

Sub tend' arĝenta, nigra tolo,
eksvingi krucon sen konsolo.

En nigro, peza arĝentumo,
Sufoke sveni pro torĉfumo.

Kun krakaj ombroj batalante
Obtuzan psalmon ĝemi kante.

Aŭskulti je orgen' muĝtrema,
Tombsonorilo profundĝema.

Paŝi tra tombaj kavoj glutaj
Kun nigra pastro, knaboj mutaj.

Treme, kaŝe, ŝtele, rigide
Mortinton fremdan fiksi vide,

Frosti sub luno superstiĉa,
Spiregi en incenso riĉa.

Pri la Pasint' brustbati brue,
Sub sorĉ' fatala, surgenu.

Pripenti ĉion kaj sub rompo
Konfese ĵeti sin al tombo.

Testamenton teruran aŭtori
Kaj plori, plori, plori, plori.



Poezio

Verdaj karavanoj
de Mikaelo BRONŜTEJN
en *Jen, denove...*, Moskvo: Impeto, 1998, p.
13-14

Mi eltrinkis lastan gluton
El someraj rememoroj,
Kontraŭtristan kuracilon
Iluzian, multkoloran.
Kaj ekvibris malsereno
En etende vastaj horoj,
Kiam venis voko venta
De la verda karavan'.

Verdaj karavanoj, verdaj karavanoj
Migras ĉiujare al la verda land',
Al sinceraj sentoj, al amikaj manoj,
Prenu min hodiaŭ, verda karavan'.

Por la tempo trankviliga,
Por semajno multimpresa
Prenas min insul' espera
En la ŝtorma oceano.
La unikan verdan landon,
La insulon de l' Kongreso.
Trans la jaro, trans la vojo
Venos verda karavan'.

Mi forviŝos lantan larmon
Aŭ subitan pluvan guton
En angoro adiaŭa
Ĉe vespera vagonaro.
Prenis la kuranta tempo
La semajnon en minuton,
La minuton de l' feliĉo
En la longa, longa jar'.



Por infanoj

La birdetoj de avo

--Avo – diris Joĉjo al la maljunulo – rigardu kiom da birdetoj estas en la ĝardeno! Kion ili faras?

--Ili estas miaj amikoj – respondis la avo kaj li ekridetis – Ili helpas al mi.

--Ĉu ili helpas al vi? Kiel?

--Miaj malgrandaj amikoj pereigas la insektojn, vermojn kaj tiel sur la fruktoarboj estos multaj, sanaj fruktoj, kiujn ankaŭ vi tre ŝatas. Ĉu ne?

--Ĉu la birdetoj helpas al vi senpage?



--Kial ne? Ili nur kompensas mian zorgadon pri ili. Certe vi rememoras, dum la frostaj, vintraj tagoj ĉiutage mi donis al la birdetoj nutraĵojn. Pro la granda neĝo kaj glacio ili ne trovintus grajnoj sur la tero kaj ili estus malsatmortintaj. Oni devas helpi al la birdetoj vintre kaj tiel ili helpas al ni, kiam alvenas la varma printempo.

--Avo, kiel ili scias al kiu ili devas helpi? En ĉiu ĝardeno ne estas birdomanĝejo.

--Kara mia, la birdetoj estas saĝaj bestoj. Ili ne forgesas de kiu ili ricevis grenojn kaj aliajn nutraĵojn.



--Ĉu ili scias? – ekmiris la knabeto – En la sekva vintro ankaŭ mi faros birdomanĝejon kaj mi donos al ili ĉiutage grenojn. Ĉu ili helpas ankaŭ al mi solvi la hejman taskon?

La maljunulo ekridis kaj ekkaresis la kapon de Peĉjo.

--Ho, kara mia nepeto, la birdetoj helpas nur en la ĝardeno. Ili ne povas solvi vian hejmajn taskojn kaj aliajn. Tiujn vi mem devas fari por ke en la lernejo la instruistino laŭdu vin.

La knabeto iom malgajiĝis kaj li diris:

--Mi esperis, ke la birdetoj helpos ankaŭ en tio. Ĉu ili ne scias adicii kaj fari aliajn matematikajn taskojn?

--Ili ne bezonas tion. Ili estas la majstroj de la pereigado de la malutilaj insektoj kaj vermoj. Ni ne atendu de ili tion, kion ili ne povas fari!



--Ĉu ili ĉiam helpas?

--Jes, kompreneble. Ili scias, kie en kiu ĝardeno ili ricevis nutraĵon en la frostaj monatoj kaj ili printempe revenas por helpi. Rigardu, mi apenaŭ devas aspergadi per kemikaĵoj, ĉar la birdetoj pereigas la insektojn, vermojn. La birdohelpo estas la plej utila defendado en la ĝardeno. Bedaŭrinde oni ofte forgesiĝas pri ĝi, kaj prefere uzas kemikaĵojn. Per ĝi oni kaŭzas domaĝon ankaŭ por la etaj bestoj, eĉ ankaŭ por homo. Tiaj fruktoj ne estas sanaj, per ili ni venenigas ankaŭ nin.

La knabeto aŭskultis la avon kun brilaj okuloj, kaj li decidis, malgraŭ tio, ke la birdetoj ne scias adicii kaj ili ne povos helpi al li por solvi la matematikajn taskojn, vintre ankaŭ li faros birdomanĝejon.

--Avo – li diris – ĉu vi helpos al mi fari birdomanĝejon, ĉar vintre ankaŭ mi volas nutri la birdetojn. Printempe ankaŭ en nia ĝardeno estos multe da birdoj, kiuj helpos pereigi tiujn malutilajn bestetojn. Almenaŭ mia paĉjo ne devos aspergi per kemikaĵoj la fruktoarbojn kaj la legomojn.

--Tre volonte, kara mia nepeto, mi helpos al vi. Ankoraŭ ĉi somere ni faros kune tian birdomanĝejon, eĉ donos al vi grenojn. Kiam alvenos la malvarma vintro, per ili vi povos regali la malsatajn gastojn. Vi ekvidos, kiom rapide ili alkitimiĝos tien kaj ili fariĝos viaj bonaj amikoj. Mi ĝojas, ke ankaŭ vi deziras defendi la naturon. Jam infanaĝe oni devas ellerni, kiel vivi sane sur nia tergloba.

Ankoraŭ en tiu ĉi tago ili komencis fari el ligno birdomanĝejon.

-Onklo Adalberto-



Fabelbildoj

Divevu la titolojn de la sekvaj fabeloj!

